

ADORU 396

1. Ve-nu, kre - dan - toj, kan - tu al Di - o.
2. Ve-nu, kre - dan - toj, kan - tu al Kris - to!

Am Em Am C D7 G
Glo - ra Li es - tas pre - ter i - mag'.
Fi - lo de Di - o, ni - a Sa - vant'.

C Am Dm7 C/E F D/F#
Plej - po - ten - cu - lo, ĉi - on re - gan - ta,
Kvan - kam e - ga - la al la Di - Pa - tro,
C/G C/EDm7 G F G7
Lin kun fer - vo - ro ser - ĉu ni nun.
Li en - kar - ni - ĝis en Bet - le - ĥem'.

3. Ne kiel reĝo inter riĉuloj,
sed kiel bebo de virgulin',
kiu Lin naskis ne en la hejmo,
sed sur la fojno en besta stal'.
4. Tamen anĝeloj Lian alvenon
ĝoje anoncis al paŝtistar'.
«Gloro al Dio en la plejalto,
paco sur tero kaj Di-favor'.»
5. Kreskis la bebo, kaj Li fariĝis
de l' Dia vero viva perant',
lumo de l' mondo, pano de l' vivo,
bona paŝtisto por Sia greg'.
6. Por ni Li mortis, krucumiĝinte,
Dia ŝafido, elaĉetaĵ'
por la pekuloj de l' tuta mondo,
anstataŭanta ofer-viktim'.
7. Li releviĝis, iris ĉielen,
kaj Li revenos fine en glor'.
Li nin ne lasis orfaj en mondo,
restas ĉe ni per Sia spirit'.

8. Sankta Spirito, Dia gvidanto,
lumon de l' vero verŝtu sur nin.
Forta helpanto, tenu nin firme,
por ke neniam vagu ni for.

9. Do ni al Patro, Filo, Spirito,
kantu fervore pri nia sav',
pri la mirinda, neesprimebla,
save-serĉanta amo de Di'.

VENU, KREDANTOJ • M (Buessan): antikva irlanda popola melodio antaŭ
1900, religie antaŭ 1933, konata ankaŭ sub la nomo Morning has broken, AK
1 • E (originale verkita): W. J. Downes 1967 • AK 1 • 7a strofo Albrecht
Kronenberger 1996 • ↑ Psa 104,33